

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

1. La luno nun leviĝis,
La steloj eklumiĝis,
Subiĝis jam la sun'.
Silentas la arbaro
Kaj super la kamparo
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel
Hejmeca ĉambro, tiel
Trankvila estas ĝi.
Dormante ĉiun penon,
Aflikton kaj ĉagrenon
Dum nokta hor' forgesu vi.³

3.) Jen staras ĉe l' ĉielo
Tre eta fora stelo,
Sed tamen egas ĝi!
Ja estas ofte aĵo
Por ni nur ridindaĵo;
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

4.) Ni homaj fieruloj,
Mizeraĵoj ni pekuloj,
Malmulton scias ni!
Ni faras multajn aĵojn
Kaj artajn elpensadojn,
Sed vana estas tio ĉi.

5.) La Dian savon vidu
Ni nur kaj ni ne fidu
je vanta iluzi'!
Ni malfieraĵoj iĝu,
Ni ĝoju kaj piŝu,
Infan-egalaj estu ni!

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Joachim Gießner

1. La luno jam leviĝis,
steletoj ekheliĝis,
ravante homojn nin.
Silentas la arbaro
kaj super la kamparo
nebulo pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,
la mond' ne plu sin movas
sub paca, klara lun'.
Nun petu noktan benon,
de l'tago la ĉagrenon
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo
en brila ronda belo
duon-videbla nur.⁴
Ĉar multon ni ne vidas,
ni ofte ĝin priridas,
malsaĝe juĝas kun plezur'.

4.
.....
.....
.....
.....

5.
.....
.....
.....
.....

...

³alia versio:

2.) Aĥ, kiel trankvileca
La mondo kaj hejmeca
Vespere estas ĝi!
En tiu kalma paco
Ekdormu vi pro laco,
Forgesu la aflikton vi!

⁴S-ro Gießner unue tajpis:
duona tamen nur.

6.) Finfine vi nin prenu
 El tiu mond', ĉagrenu
 Ni ne pro tio ĉi!
 Kaj kiam vi nin prenos,
 Ho faru, ke ni venos
 En vian regnon, kara Di'!

6.

7.) Gefratoj, enlitiĝu,
 Trankvile endormiĝu!
 Noktiĝas ĉie ĉi;
 Vin gardos nia Dio.
 Li regas super ĉio.
 Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!

7. Ĉe l'fino de la tago
 kuŝigu vin sen plago,
 silentas la anim'.
 Ne punu nian faron,
 sed nin kaj la najbaron
 dormigu, Dio, nun sem tim'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de
 MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21)
 en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-
 04) en 1989-09-10.*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de
 MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21)
 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-
 23 - †2003-11-25).*

MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-03-26 13:19:45)

Arg-394-782 (2007-03-28 09:55:34)

*Tiu ĉi traduko estas unue publikigita en 1984 en
 "Esperanto aktuell", numero 6/1984, la organo de
 Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj
 paĝoj", paĝo 15. Enigis ka tekston de la traduko la ti-
 ama redaktisto d-ro Dirk Willkommen. Mi, Manfred
 Retzlaff, ŝanĝis en 2007-03-26 nur la duan strofon,
 kompare al la teksto aperinta en "Esperanto aktuell
 6/1984".*

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis tiun tradukon de Joa-
 chim Gießner el folio kun letero, kiun skribis al mi
 en 1987-11-24 s-ro Joachim Gießner. Li skribis en
 tiu letero, ke la fakto, ke lia traduko de la unua stro-
 fo estas tute la sama kiel en tiu de Otto Bonte, estas
 hazardo kaj ke li ne sciis antaŭe la tradukon de Otto
 Bonte.*